



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakejo: Str. RODA, n.º 14-16

NIA RIKOLTADO

—Jen ĉie, ĉiuj forte kantadas;
alvenas ĉien venka la kanto,
el kiuj ĝoje nun laboradas
por Esperanto.

El tiu, kiu dum la aŭtuna
kaj ĝusta tempo, kiel semanto,
ekjetis semon en tero bruna...
por Esperanto.

El tiu, kiu estis atenta
dum vintra tempo, kiel zorganto,
el kiu penis ĉiam silenta
por Esperanto.

Printempo bela jam alvenas baldaŭ
kreskajo kreskas, kaj laboranto
pro tio ĝojas; ĝoju ni ankaŭ
pro Esperanto.

Ni ĝoju: vidu: printempo venis
la suno ŝajnas hela brilanto;
ni ĝoju nune, ni, kiuj penis
pro Esperanto.

Ĉar la somero estas proksima
alvenu ĉien venka la kanto;
montriĝu nia ĝojo senlima
pro Esperanto!

EGALANIMECO

(De Johano Moneva kaj Puyol).

Baniĝonto: Eniru en la maron per trankvila
paŝo, kiel vi marŝas surtere; sin deteni apud la
akvo estas malkuraĝo; eniri en ĝin subite, ankaŭ;
tio estas fuĝo al malamiko.

Studento: Trairu per egalaj paŝoj la tempon de
oktobro ĝis junio aŭ de julio al septembro;
komenci vivege estas de impulsiĝemuloj; tiel fini

estas de mallaboremuloj neglektintaj aŭ de sent-
konfuzitoj sin ne konantaj.

Gefianĉoj: Trankvile iru la amkuradon: tiel
plaĉa ĝi estas ke akceli ĝin estas ĝin misuzi.

Geedzoj: Por vi ne estas speciala konsilo: geed-
zeco estas la amkurado mem: estu kiel gefianĉoj
sen interna maltrankvilo; de maltrankviloj el eks-
tere venantaj vi ne liberiĝos.

Homo: De la floranta juneco vin ekmontru al la
plenkreska aĝo: de la plenkreska aĝo vin ekmon-
tru al la maljuneco: de la maljuneco vin ekmontru
al la morto; de la mezo de la kutima vivado, vivu
ekmontrita al ĝi senĉese; eĉ tiel ĝi surprizos vin.

Sed, de kiam vi rezonos, vivu ekmontrita al via
propra konscio. Se vi tion faros, nenio, eĉ ne la
morto, vin surprizos.

Trad. J. Orós.

Rim de Red. — La supra verko estas la antaŭpa-
rolo de interesplena libreto de pensoj kolektitaj
de la tre klera Profesoro de la Zaragoza Univer-
sitato Sr. Moneva y Puyol, kiu afable permesis al
ni traduki ĝin por NIA VIVO.

Tiu verko enhavas multe da pensoj en kastila,
latina, kataluna, galicia, vaska, franca, angla,
germana kaj nederlanda lingvoj, eltiritaj el famaj
antikvaj kaj nuntempaj pensuloj, kiel Alemán,
Alighieri, Andrónico de Rodas, Arenal, Ariosto,
Aristóteles, Balaguer, Balzac, Benavente, Bis-
marck, Bolívar, Bonaparte, Calderón de la Barca,
Byrón, Carlos M.^a Cortezo, Costa Chopín, Mora-
tin, Fichte, Gandhi, Ibsen, Jaurés, Lamartine,
Lassalle, Livio, Machiavelo, Mahoma, Marcial,
Milton, Montesquieu, Newton, Ovidio, Pascal, Pe-
trarca, Platón, Ramón y Cajal, Richelieu, Rou-
sseau, Schopenhauer, Séneca, Shakespeare, Só-
crates, Tagore, Unamuno, Vitoria, Voltaire, Wil-
son, kaj multaj aliaj, kun du indeksoj: unu de
aŭtoroj kaj alia de temoj, ambaŭ alfabetorde
kompilitaj.

Duona folio de papero

Rakonto de August Strindberg

La lasta ŝarĝveturilo malaperis; la luinto; juna viro, kiu havas funebran krepon sur la ĉapelo, marŝas ankoraŭ foje tra la ĉambraro por rigardi, ĉu io estas forgesita.

Sed nenion li forgesis, tute nenion, kaj li ree iras el la ĉambraro, en la vestiblon; li volas forgesi ĉion. Li en ĉi tiu loĝejo travivis.

Jen vidu, en la vestiblo, apud la telefona aparato estas duonfolia papero alligita, kaj ĝi estas plenskribita kun multaj stiloj, unuparte klare per inko, aliparte aĉe per kraĵono, aŭ ruĝa kreto. Sur la papero estas skribita la tuta bela historio, kiun li travivis ĉi tie en la mallonga tempo de du jaroj; ĉio, kion li volas forgesi, estas ĉi tie skribite, peca parto de homa vivo sur duona folio de papero.

Li prenas la paperon de la muro, ĝi estas pro sunlumo flava papero. Li metas ĝin sur la frison de la kahela forno, kaj kliniĝinte super ĝin li legas. Unue estas skribita ŝia nomo, Alice, la plej bela nomo, kiun li konas, ĉar estis la nomo de lia fianĉino. Kaj la telefona numero 1511. Gi aspektas kiel himnara numero en preĝejo! Poste estas skribite: La banko. Estis lia laboro, la sankta laboro, kiu donis la panon, la hejmon kaj la edzinon, la fundamento por la ekzistado. Sed la vorto estas forstrekita, ĉar la banko bankrotis, kaj li saviĝis dank' al alia banko post mallonga tempo de maltrankvilo.

Poste estas skribite: Florvendejo kaj luiganto de droŝkoj. Estis la fianĉiĝa festo, tiam li havis la poŝon plena de mono.

Kaj nun estas legeble: Mebla vendejo, la drapiŝto. Li edziĝis. Ekspresa oficejo: Ili enloĝiĝas. La bileta oficejo de opera teatro 5050. Ili estas novedziĝantoj kaj vizitis la operan teatron dum la dimanĉoj. Estis la plej bona tempo, tiam ili mem sidis silentaj kaj renkontis unu la alian en la beleco kaj harmonio de fabela lando malantaŭ la kurtenoj.

Nun sekvas vira nomo, kiu tamen estas surstrekita. Estis amiko, kiu atingis altecon en la socio, sed ne povis la feliĉon porti kaj falis, nekorekteble, kaj devis vojaĝi malproksimen. Tiel kaduka la vivo estas.

Videble ĉi tie novaĵo okazis en la vivo de la geedzoj. Estas skribite de virina mano per kraĵono: «La sinjorino». Kiu sinjorino? Jes, ŝi kun la granda mantelo kaj afabla vizaĝo, venanta senbrue, neniam tra la salono, sed tra la koridora vojo al la dorma ĉambro.

Sub ŝia nomo estas skribite Doktoro L.

Unuafoje estas videbla la nomo de «Patrino». Estas la bopatrino, kiu diskrete estis malproksima por ne ĝeni la novajn geedzojn, sed nun alvokiĝis en la tempo de danĝero kaj venis kun ĝojo, ĉar oni bezonas ŝian helpon.

Nun komenciĝas malneta skribajaĉo skribite ruĝe aŭ blue.

Komisio oficejo. La servistino finis sian oficon aŭ nova estis dungata. La apoteko. Hm! Mallu-

miĝas! La lakta vendejo. Oni aĉetis lakton, sen tuberkulozaj baciloj. Alispeca butikoj, porkaĵejo. Oni zorgas pri la hejmo telefone; do, la mastrino ne estas ĝustloke. Ne, ĉar ŝi estas malsana. La poste skribitan vorton li ne povas legi, ĉar mallumiĝas por liaj okuloj, kiel mallumiĝas por mardronanto, kiu volas rigardi tra la salan akvon.

Sed sur la papero estas skribite: entombiga oficejo. Tio ja parolas suface!—Unu granda kaj unu malgranda, neesprimite, ĉerkoj. Kaj parenteze estas legeble: Restajo.

Nenion pluan oni skribis sur la paperon. Restajo estas la lasta vorto. Kaj restajo la viva epilogo!

Li prenas la sunpaperon, kisas ĝin kaj metas ĝin en la poŝon. Dum du minutoj li revivis du jarojn de sia vivo. Li ne estas klinita, tiam li eliras la ĉambraron, kaj portas la kapon alte, kiel feliĉa kaj fiera homo, ĉar li ja *posedis* la plej belan.

Multaj, multaj homoj ĝin ne posedis!

PATRINA ORDONDEKO

1.—Mi penos, ke mia filo venu en la mondon en la plej bonaj proprecoj de fizika sano.

2.—De kiam li ekzistos, mi ĉiumomente vivigos lin en la plej bona, spirita medio kaj en pura aero, kaj liveros al li sanan nutron taŭgan por liaj organismaj bezonoj.

3.—Mi estos lia nutristino tage kaj nokte; kun mi li lernos paroli kaj pensi.

4.—Mi instruos al li laŭdi Naturon kaj admiri ĝiajn farojn eĉ en la plej sensignifaj aĵoj de la vivo; mi konvinkos lin, ke viro sen religio estas kiel vojaĝanto sen kompasoj, ĉaro sen direktilo, rivero sen fluejo, spirito sin forlasinta al la aventurado, al la malfeliĉo.

5.—Mi enradikigos en lian spiriton la amon al la homaro, sen egoismo; mi kutimigos lin juĝi bone siajn similulojn; mi penos formi ĉe li justseveran, kritikan spiriton; mi komprenigos al li la rilatojn de la aĵoj kaj ankaŭ, ke krimemo venas el organismaj difektoj kaj animaj malsanoj.

6.—Mi instruos lin ami kaj mi lin konvinkos ĉiutage, pri tio ke ĉe la mondo estas krizo de vera amo.

7.—Mi faros lin morala, kiam li pensos, atenta, kiam li aŭskultos, modera, kiam li parolos, justa, kiam li postulos, malavara, kiam li favoros, inda, kiam li estos ofendita, modesta, kiam li pensos pri si mem kaj heroa, kiam li batalos malvirtojn.

8.—Mi faros, ke li sin instruu adaptante sin al la tempo, en kiu li vivos, kaj al siaj cerbaj kapabloj, ĝustetaksante sin, sen troa emo sin elmontri, kio faras la viron vanta nek tro granda modesto, kiu lin malsaĝigas.

9.—Mi penos lin kutimigi eliri venkinte el ĉia entrepreno, defendante sin ĉiam per siaj propraj morallfortoj, valorigante sin mem kaj helpante la ceterajn, la aliajn anstataŭ senti la humiligon

vidi, ke aliaj pli potencaj lin subtenas, kvazaŭ li estus malforta arbeto bezonanta helpon por stari.

10.—Mi faros lin sparema pri sia sano kaj kapabloj kaj sin montri rezervema pri ili, por ĝui sanan kaj trankvilan maljunecon.

El la hispana tradukis.

JOSÉ M.^a CODERQUE (Rondano 4.^a).

Ateca.

A V I Z O

**por la mendintoj de la esp. kontraŭmilitaj
glumarkoj eldonataj de la rondeto «Espe-
ranto kaj Paco» de Zaragoza. (Hispanujo).**

«Esperanto kaj Paco» estas rondeto de internaciismaj amikoj, entuziasmuloj de nia helplingvo Esperanto, kaj sinceraj amantoj de vera, tutmonda paco, kies celo penas propagandi ĉien.

«E. k. P.» estas sendependa pri la esp. societo «Frateco» de Zaragoza, kvankam kelkaj el siaj membroj apartenas al ĝi kaj al la ceteraj, esp. societoj de Zaragoza. «Frateco» afable permesis al ni uzi ĝian adreson kaj ĝian monatan bultenon por faciligi niajn interrilatojn kun la tutmonda esperantistaro okaze de la eldono je la pacglumarkoj.

Ĉi tiu rondeto, kiel ilo por tia celo, decidis eldoni, dank' al la monhelpo de la samideanoj formantaj la diversajn esp. societojn de Zaragoza (kaj sen ies profito, kompreneble!) 128.000 glumarkojn por Esperanto kaj kontraŭ milito.

Forte impresitaj de ĝia bona akcepto, «E. k. P.» decidis denove presigi duan eldonon plibeligitan litografie, konsistantan el 500.000 glumarkoj.

«E. k. P.» agas libere kun ĉies helpo klopodante realigi ĉiujn ajn samcelajn ideojn pri Paco, Esperanto kaj internacia kunfratiĝo. Ĝis nun, tion faris «E. k. P.» sukcese, sed bedaŭrinde en tiu ĉi okazo ĉiuj niaj bonaj deziroj ektuŝegis la neseriozecon kaj la malfeliĉon de la litografisto, sinjoro Mariano Castro, kiu parole kaj subskribe, serioze permesis al ni multfoje, plenumi la duan eldonon je la esp., kontraŭmilitaj glumarkoj.

Ni, vidante la protestojn pro nia senvola prokrastegado je la dua eldono, kaj estante tute senkulpaj, penas klarigi resume tiun ĉi malfeliĉan historion. Ni havas specialan intereson pruvi, ke «E. k. P.» agas ĉiam senprofite: ni ne estas komercistoj. Kontraŭe, nia malprofitemo faris kaj okazigas al ni oftajn malplaĉojn kaj elspezojn, pro la nekompreneo de kelkaj el la aliaj.

Pro la gravaj facilajoj, kiujn la sinjoro litografisto donis al ni, tio estas, pro dankeco, malmultekosta prezo, k. t. p. ni ne postulegis kuraĝege al li fini la eldonon. Tamen ni iris ĉe la litografejon ĉiutage por kontroli la faritan laboron dum la lastaj ok monatoj. Ni povis kontroli, ke ĉiutage la desegno sur la litografa, ŝtona kliŝo kreskis, kvankam malrapide.

Kiam la ŝtona kliŝo finfine estis, feliĉe finita (dum la monato Aprilo 1934) nepensite aperis bedaŭrinde grandaj, financaj malfacilaĵoj en la

litografejo de sinjoro Castro, kiu estis devigata haltigi siajn laboraĵojn.

Tiuj okazintaĵoj, kaj diversaj, gravaj, ĝeneralaj strikoj (la lasta daŭris 35 tagojn) malpermesis al sinjoro litografisto fini la eldonaĵon.

Feliĉe, venkitaj nun la diritaj malfacilaĵoj, «E. k. P.», tre gaje, anoncas al la tutmonda esperantistaro, ke la glumarkojn menditajn ĝis nun, oni dissendos tre baldaŭ; eble, kiam ili ricevos ĉi tiun bultenon, ankaŭ ricevos ili la menditajn glumarkojn.

Ankaŭ ni devas averti la esperantistaron, ke la novaj mendoj valoras kaj kostos, iomete pli, ĉar sinjoro litografisto malgajnis kelke da mono dum la lastaj laboraĵoj. Ni ĝustatempe anoncos la novan prezon.

Por pruvi nian seriozecon kaj formalecon, kaj kvankam ni ne permesis publikigi niajn nomojn pro iomete da modesteco, en tiu ĉi okazo kaj pro la okazintaĵoj, kaj malkonfidoj rimarkitaj de ni, ni konsideras, ke estas necese doni niajn nomojn por esti ni ĉiam la responduloj, morale kaj materiale, pri tiu ĉi malfeliĉa afero. Tio estas, ke trans la nomo «Esperanto kaj Paco» ne estas kaŝitaj niaj personoj por fari malbonaĵojn. Pro tio, je la fino de ĉi tiu skribaĵo ni subskribas.

Al tutmondaj geesperantistoj ni bonpetegas, ke ili bonvolu pardoni nin pro nia senvola prokrastegado kaj niaj malfacilaĵoj. Pro tio ni ĉiam estos dankaj al ili.

Je la nomo de la rondeto «E. k. P.».

José Vallojera Royo; Pablo San Clemente; Justo Bosch Sanz; Luis Martínez Ungria; Domingo Arribas Mateos; Miguel Fillat.

Zaragoza, la 8^{an} de Aŭgusto de 1934^a.

SPRITAĴOJ

Du mensogemaj andaluzianoj parolas pri siaj respektivaj fizikkapabloj kaj iu el ili diras al la alia:

—Mia vidpovo atingas eĉ pli, ol teleskopo: mi nun vidas kulon, kiu estas sur tiu turo.

La alia troemulo respondas:

—Ja mi ne kapablas vidi tiom, kiom vi, sed mi aŭdas tre klare ĝian zumadon.

Romanverkisto vespermanĝas en restoracio. La kelnero servas lin tiel malafable, akre kaj malrespekte, ke la verkisto estas devigata lin diri:

—Ĉu vi ne povas servi iomete pli ĝentile?

La kelnero respondas lin krude kaj eĉ ofendeme. Tiam la unua rediras al li kviete:

—Nu, vi agas malbone min traktante tiel... Ĉu vi scias, kion la sorto liveros al vi?... Eble via vivvojo ŝanĝiĝos kaj anstataŭ kelnero vi devos esti kliento.

Ŝi—Do vi asertas, ke, se mi rifuzos vian amon, vi tuj mortigos vin mem. Ĉu ne?

Li—Yes, fraŭlino, en tiaj okazoj mi ĉiam faras tion.

Svatisto prezentas al kliento virinon, kiun li proponas al li por edzino. Tre malkontenta pro la elekto la kliento irigas lin flanken kaj mallaŭte riproĉas:

—Kial vi ĉi tien venigis tion? Ŝi estas ja malbela, strabokula, maljuna, sendenta...

La svatisto interrompas lin:

—Parolu laŭte prefere. Ankaŭ ŝi estas surda.

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

La sepan de julio okazis la ĝenerala jarkunveno kun granda nombro da ĉeestantoj, inter kiuj ekzistis eksterordinara entuziasmo.

Oni elektis la komitaton por la nuna jaro, kiu estas la jena:

PREZIDANTO: D. Alberto Díaz.

VICPREZIDANTO: D. Federico Garrido.

SEKRETARIO: D. Eduardo Larrouy.

KASISTO: D. Eugenio Herrera.

VOĈDONANTOJ: Fno. Felisa Otaola, D. Saturnino Montero y D. Pedro Ch. Aguilar.

Oni aprobis diversajn proponojn por la divas-tigo de Esperanto tra la provinco kaj kelkajn, interesajn proponojn.

La dudekunuan de junio finis la malgranda, somera kurso ĉe nia grupo kun 12 partoprenintoj, kiuj daŭrigas dum unu tago semajne la ellernado de kelkaj gramatikaj duboj.

Ĉi tiuj klarigoj okazas ĉiusemajne la merkredojn kaj en ĝi partoprenas ĉiuj anoj el la grupo.

NOVAĴOJ EL VALENCIA REGIONO

La 15-an de junio 60 gesamideanoj de Cheste veturis motoromnibuse al Bugarra por inaŭguri esperantistan grupon. En la vojo atendis ilin Sro. Gimeno, eksprezidanto de la grupo de Cheste kaj fondinto de tiu de Bugarra, kaj la ceteraj, tieaj esperantistoj. Okazis dancado, babilado, ekskursoj ktp. ĉe la gejunularo kaj poste en elektrofabriko, apud rivero Turia oni gaje tagmanĝis. Je la 5-a posttagmeze okazis en la tutplena teatro propagandifesto prezidata de la urbestro de Bugarra. Post bonvenigo de la sekretario legis allogan poezion la belaj fraŭlinoj Tamarit kaj Ferrando kaj knabo Navarro kaj parolis propagande Sroj. Mañez, Tamarit kaj Fino Tamarit; ĉiuj tre aplaŭdataj, speciale la lasta.

Entute, sukcesplena soleno kaj granda entuziasmo ĉe la enloĝantoj de Bugarra, kie funkcias kurso por viroj kaj alia por virinoj en saloneto liverita senpage de la samideano Sro. Marco.

En Cheste Fino Elinjo Pahn klarigis Ĉemetodan kurson tre sukcese kaj en Chiva ĉi tiu fraŭlino kaj Sro. Mañez faris paroladojn kaj daŭrigis kurson por 25 personoj dum monato junio.

En Requena ankaŭ paroladis Fino. Pahn kaj Sro. Mañez antaŭ multnombra publiko prezentite de nia samideano Dro. Sánchez kaj pli, ol 40 gelernantoj, partoprenis kurson. En ĉi tiu kurso same, kiel en tiu de Chiva tre ĉarmaj fraŭlinoj lernis nian lingvon.

PENSOJ

Oni ne devas timi malriĉecon, nek ekzilon, nek malliberecon, nek morton; sed oni devas timi la timon.

(*Epictetes*).

Ni ĉiuj timas je la morto de korpo, sed je la morto de animo, kiu timas?

(*La sama*).

La saĝulo savas sian vivon, ĝin perdante.

(*La sama*).

Nia bono kaj malbono estas nur en nia volo.

(*La sama*).

La dioj kreis ĉiujn homojn, por ke ili estu feliĉaj; ili estas malfeliĉaj nur pro sia kulpo.

(*La sama*).

Ne petu, ke la aferoj okazu, kiel vi deziras; sed deziru, ke ili tiel okazu, kiel ili ja okazas kaj vi ĉiam prosperos.

(*La sama*).

Feliĉo kaj deziro ne povas kunesti.

(*La sama*).

SCIIGOJ

Niaj karaj gesocietanoj Fino. Pilar Salvo kaj Sro. Fillat geedziĝis la pasintan monaton julio. Ni tutkore gratulas ilin kaj deziras por la freŝa, geedza paro multan feliĉon en sia nova stato.

La gelernantoj de nia honora Prezidanto Sro. Maynar por montri sian dankon al li pro klarigado je Esperanto-kurso en la ejo de Casino Mercantil Industrial y Agrícola de Zaragoza, kies Prezidanto li estas, regalis lin per honormanĝo, en kiu Doktorino Diego de Machetti legis belan danksaluton esperantlingvan, kie ŝi laŭdis la sindonemon kaj varman esperantismon de Sro. Maynar, kiu tre kortuŝite dankis al ĉiuj tiun elpruvon je amikeco kaj instigis la novajn pionirojn kunhelpi por la propagando je nia dua lingvo.

Ni avizas ĉiujn Fratec'anojn, ke la regularo de nia societo jam estas por disvendado en la sekretariejo de Frateco. Ĝia kosto estas 0'25 pesetoj.

MONHELPANTOJ JE NIA VIVO

Ni publikigas la trian liston de mondonacoj por helpi nian karan gazeton:

Sroj. B. Serrano, el Morata de Jalón, 3'00 ptoj.; Fratec'anoj el Zaragoza, 6'00; X. X., el Madrido, 12'00; Vázquez, el Madrido, 2'00; J. Juste, el Zaragoza, 1'00; J. M.^a Coderque, el Ateca, 6'00; R. Moreno, el Madrido, 3'00 kaj Fino. P. Tramullas, el Jaca, 3'00.

Ni korege dankas al ĉiuj.